

KATALUNA ESPERANTISTO

DUMONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



NOVEMBRO-DECEMBRO 1930

N-RO 174

Primer Manual d'Esperanto

en kataluna lingvo

Primer Manual de Esperanto

en hispana lingvo

32 p. - Unu ekzemplero: Ptoj. 0'25

La hispana eldono estas en preparo

KATALUNA ANTOLOGIO

DUA ELDONO

REKOMPENCITA DE LA
"ESPERANTISTA AKADEMIO"

DIKA VOLUMO KUN 416 P., 16 × 22 CM.

PREZO: 10 PESETOJ

PLUS SENDKOSTOJ

KATALUNA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

ADRESO: Duran i Bas, 8 - BARCELONA

JARABONO:

Enlande: 5 pesetoj
Eksterlande: 6 pesetoj

DIREKTORO:

JAUME GRAU CASAS, L. K.

I TANMATEIX ES MOU!

En el reportatge aparegut al número 92 de MIRADOR (L'idioma que s'escriu, però no es parla) sobre el moviment esperantista barceloní, hom feia, amb l'habitual agilitat dels repòrters, al·lusions al suposat fet que els esperantistes, àdhuc d'un mateix país, parlant esperanto ells amb ells no s'entenen. Una tal constatació era la rebentada més grossa dels partidaris de la llengua auxiliar internacional, el blasme d'una utopia... si no era la rialla cruel d'un fàcil humorisme.

I bé: cal que els esperantistes riguem sorollosament de l'eficàcia i de la brillantor amb què s'entén, en moltes ocasions, un conjunt d'interlocutors *multilingües*, que no és ben bé el mateix que políglotes. Cal haver penetrat en la vida europea i haver constatat el *meravellós* èxit d'intercomprensió de tants i tants congressos internacionals de tota mena d'especialitats, on són admises vàries llengües, però on predomina sempre una llengua—generalment la llengua del país—, per a fer-se una idea de la part flaca dels qui malden per entendre's: la part còmica dels llavis que no s'expressen, la part tràgica dels cors que no es comouen...

Cal capir les excel·lències del francès culinari, de l'anglès dels films parlats i de l'espanyol dels prospectes de productes estrangers, per a saber què cosa és *bellesa d'expressió, naturalitat*...

Sense recórrer al llibre de Charles Richet "L'homme stupide", sense arguments trascendentals, només amb les armes de la facècia, hom pot respondre als detractors de *l'idioma que es critica*,

però no es coneix. Si aquell marit alemany anava a Caldetes, amb la senyora, "a tomar bañas"; si hom caricaturitza el ciutadà anglès que parla malament tot altre idioma que el seu; si parlant en català es pot escarnir un italià *macarrònic*, cal no riure's massa de l'esperanto perquè hom li atribueix una fonètica diferent de la que té en realitat. Si s'és amant del *calembour*, en esperanto — veritable llengua vivent — hom podrà dir *litografo* (litògraf) i hom podrà entendre, a més, *lito-grafo* o sigui *comte* que li agrada estar-se al *llit*. Si no tots els esperantistes, malgrat la *relativa* facilitat de l'esperanto, el parlen amb tota correcció, cal recordar l'espanyol de la *gente bien*, el francès de molts diplomàtics, el llatí dels capellans i el grec d'alguns humanistes.

Una cosa és l'ús del francès, de l'anglès o de l'alemany, entre dos interlocutors un dels quals és francès, anglès o alemany, i altra cosa és l'ús del francès entre un búlgar i un italià o l'ús de l'anglès entre un català i un egipci. Encara, una cosa és conversar i l'altra parlar en públic; i una cosa és l'adreçar-se als estudiants de Halle o als professors de la Sorbona, i l'altra l'haver de convèncer d'alguna cosa, en una assemblea internacional, a oients de diverses procedències. El problema es planteja més clar; la solució es fa més visible. L'esperanto pot provocar el riure quan hom l'examina d'una manera frívola, però presenta una pila d'aspectes interessants als que s'hi acosten amb intenció seriosa.

No cal que teoritzem, ni que presentem fets, perquè el fer-ho semblaria esperit de prosselitisme. Només hem volgut parlar als nostres co-lectors de MIRADOR, en defensa d'un ideal — el d'una llengua internacional — fàcilment justificable als ulls dels qui han defensat l'ideal de la llengua nacional.

No neguem el dret a riure's de l'esperanto. Però afirmem el nostre dret a dir que el nostre ideal progressa, en les amplàries del món, molt més del que hom pensa, que tenim les nostres organitzacions, els nostres congressos, les nostres revistes, els nostres cinc mil llibres, que ens entenem, que som una *super-cultura* en marxa. Que no exagerem, que existim, que esperem...

Cal dir tot això, majestuosament, davant dels somriures d'altri. I si, malgrat tot, no podem guanyar les simpaties de tothom per al moviment esperantista, cal demostrar la nostra fe en l'esperanto, exclamant, com Galileu: E PUR SI MUOVE!

JAUME GRAU CASAS.

KONSERVADO DE LA VOĈO DE NIA MAJSTRO SUR GRAMOFONDISKOJ

Kiel anoncote, Kataluna Esperantista Federacio, laŭ instigoj de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, prenis sur sin la taskon reprodukti la voĉon de D-ro Zamenhof el la malnovaj vaksaj cilindroj impresitaj en 1909 okaze de la vizito de la Majstro dum la tagoj de la V^a Kongreso.

La tasko estas jam farita. La konata firmo "Odeon" reproduktis sur gramofondiskojn la malperfektajn sonojn de tiuj eluzitaj cilindroj.

Certe la sukceso de la reproduktado ne estas tia, kia ni estus dezirintaj. La cilindroj estas sufiĉe malbone impresitaj — ni pensu ke tiam la tekniko de la fonografo estis en siaj unuaj paŝoj; aliflanke D-ro Zamenhof parolis tre mallaŭte kaj lia voĉo restis tre malforte impresita; krome la sulkoj de la cilindroj estas jam tre multe eluzitaj kaj en kelkaj lokoj oni preskaŭ ne aŭdas la sonon; ankaŭ la fonograf-aparato por aŭdigi la cilindrojn estas tre maloportuna kaj nur per tiu aparato estas ebla la reproduktado.

Por fari la nunan matricon de la gramofondisko, estis necese lokigi la aparaton Pathé antaŭ mikrofonon, kaj per laŭtigilo, plilaŭtigi la voĉon elirintan el la preskaŭ praava aparato. Certe oni sukcesis laŭtigi la voĉon ĝis grado ne imagebla, sed ankaŭ oni laŭtigis ĉiujn bruojn kiuj sur la reproduktata disko zumas: la diafragmo kun ĝia zafira pinto rulante sur la cilindroj sonas tre forte, ankaŭ ĉiuj etaj bruoj de la fonograf-aparato kaj ĝia funkcia kordo treege enuigas dum la aŭdado de la nova disko. Sed... ni nur posedas tiajn malbonajn elementojn kaj bedaŭrinde ni ne povas ilin plibonigi.

Malgraŭ ĉio la elparolado de la Majstro estas sufiĉe klara kaj se oni atente aŭskultas proksime de la aparato, certe oni povas ĉion interpreti.

La nova disko enhavas, krom kelkaj enkondukaj vortoj de KEF, deklamon de "La Espero" kaj "Dankparoladeto" farita

de D-ro Zamenhof ĉe S-ro Sabadell, la posedanto de la cilindroj. La unua parto de la disko sonas malbone. La alia parto, tiu kiu reproduktas la paroladeton, estas pli klara, pli laŭta, pli forta, preskaŭ perfekta.

La "Eldona Fakto de KEF" zorgos pri la vendado de la nova disko. Oni nun studas la prezon, sendelspezajn, k. t. p. Ni esperas baldaŭ konigi tiujn detalojn pere de "Kataluna Esperantisto" kaj de ĉiuj esperantistaj gazetoj.

Interesatoj bonvolu sin turni al la "Eldona Fakto de Kataluna Esperantista Federacio", Duran i Bas, 8, Barcelona, por eventualaj mendoj

JOAN GILI NORTA

DUA ELDONO DE "KATALUNA ANTOLOGIO"

Ni ĝojas sciigi niajn legantojn pri tio, ke, malgraŭ la diversspecaj malfacilaĵoj renkontitaj kaj renkontataj, jam estas presitaj 160 paĝoj de tiu grava verko, finkorektitaj pli ol 300 paĝoj kaj kompostita la tuta teksto.

La samideanoj, kiuj pruntedonis monsumon por ebligi la duan eldonon de "KATALUNA ANTOLOGIO", ricevos unu ekzempleron tuj post apero.

ESPERANTO KIEL LINGVO DE EUROPA

ŜTATA KONFEDERACIO

La direktoro de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado informas nin, ke la iniciato de la grupo "Esperantanaro-Fajro" en Barcelono, kaj menciita en "Hispana Esperanto" N.º 9-10. 1930, estis ĝis nun ne konigita al ĝi kaj ke ĝi neniam ricevis informojn pri tio. La I. C. K. ĵus turnis sin al la Hispana Esperanto-Asocio kaj la Kataluna Esperanto-Federacio (ambaŭ membroj de KR) por ekscii, ĉu kaj kiaforme la iniciato okazas en kunagado kun tiuj asocioj aŭ kun unu el ambaŭ. La I. C. K. rezervas al si ekzameni la detalojn de tiu-ĉi projekto post ricevo de kompleta dokumentaro. Ĝi akcentas samtempe, ke la kompetenteco pri tia internacia iniciato estas sole en ĝia mano, en kunagado kun la respektivaj asocioj esperantistaj.

LA ELSORĈIĜO, de Pierre Loti.

(Daŭrigo)

La pezanta pordo malfermiĝis; ili troviĝis ekstere, sur monteto, kun la hela suno de la dekunua horo, antaŭ tombeja bosko, plantita de cipresoj kaj de tomboj kun estingiĝantaj orumaĵoj, kiu malsuprendeklivis ĝis profunda golfo plena de ŝipoj.

Kaj preter tiu marbrako sterniĝanta sub iliaj piedoj, preter ĝi, sur la alia marbordo duonkaŝita de la cipresoj el la malgaja kaj dolĉa bosko, alte profiliĝis, en la pureco de la ĉielo, tiu silueto de la urbo kiu de dudek jaroj naskis la nostalgian enuon de Andreo Lhéry; Stambul tronadas ĉi tie, ne plu malpreciza kaj krepuska kiel en la revoj de la verkisto, sed preciza, hela kaj reala.

Reala kaj tamen plena, kvazaŭ de ĥimera blua nebulo, de silento kaj mirbrilo, Stambul, la centjara Stambul estis ja tie ĉi, ankoraŭ tiel kiel la malnovaj kalifoj ĝin rigardadis, ankoraŭ tiel kiel la malavara Soliman iam konsciis kaj fiksas la grandajn trajtojn, alte konstruante la plej belegajn kupolojn. Nenio aspektis ruina, en tiu amaso da minaretoj kaj kupoloj grupiĝintaj en la matena aero, kaj tamen sur ĉio ĉi troviĝis iu nedifinebla postesigno de la tempo; malgraŭ la distanco kaj la iom blindiga lumo, la kadukeco vidiĝis ekstrema. La okuloj tute ne trompiĝis: ĝi estis fantomo, majesta fantomo de la pasinteco, tiu urbo ankoraŭ staranta, kun siaj sennombraj ŝtondaŭboj, tiel elegantaj, tiel altencelantaj ke oni miris pri ilia persisteco. Minaretoj kaj moskeoj kun la jaroj senblankiĝis kaj aspektis nun sennuance grizaj; kaj koncerne tiujn milojn da lignodomoj, amasigitaj sub ilia ombro, ili estis el okra aŭ brune ruĝa koloro, nuancoj mildigataj de la bluo de l' nebulo preskaŭ eterna kiun la maro elspiras ĉirkaŭ si. Kaj tiu grandega bildo reflektiĝis sur la spegulo de l' golfo.

Ambaŭ virinoj, tiu fantome vualita kaj la alia kun sia puntaĵo malzorge metita sur la haroj, marŝis rapide, sekvate de sia negra skorto, apenaŭ rigardante tiun mirindan pejzaĝon, kiu por ili estis la ĉiutaga vidaĵo. Ili iris sur tiu monteto vojon kun difektita pavimo, inter malnovaj kaj aristokrataj domoj mumiĝintaj malantaŭ siaj kradoj kaj tiu dekliva tombejo el Khassim-Pacha, kiu lasis ekvidi inter siaj malgajaj arboj la grandan kontraŭan mirpejzaĝon. La hirundoj, kiuj ĉie havis nestojn sub la krado.

mitaj fermitaj balkonoj, delire pepadis, la cipresoj odoregis rezinon, la malnova grundo plena de ostoj de mortintoj odoris jam la printempon.

Efektive ili renkontis neniun dum sia mallonga eliro, neniun krom akvoportisto, en orienta kostumo, veninta por plenigi sian felsakon en tre malnovan marmoran fonton kiu troviĝas sur la vojo, kaj estas tute skulptita per belaj arabeskoj.

En domo kun severe kradumitaj fenestroj, domo de paŝao, kie diablego kun lipharoj, per ruĝo kaj oro vestita, pistoloj en la zono, senvorte malfermis al ili la pordon, ili enpaŝis, laŭkultime, nenion dirante ankaŭ, la ŝtuparon de l' haremo.

En la unua etaĝo, vasta blanka ĉambro, pordo malfermita, el kiu aŭdiĝis voĉoj kaj ridoj el junaj virinoj. Tie, interne, oni amuziĝis per franca interparolado, sendube tial ke oni diskutis pri tualetoj. Decis ja scii ĉu iuj rozoj sur korseto estus pli belaj aranĝitaj tiel aŭ alimaniere:

—C'est bonnet blanc, blanc bonnet, diris unu.

—C'est kif-kif bourricot, — helpis alia, flavruĝulineto kun lakta vizaĝkoloro, kun mokemaj okuloj, kies instruistino longe loĝadis en Alĝerio.

Tio estis la ĉambro de tiuj kuzinoj, du fratinoj el dek ses kaj dudek jaroj, al kiuj la morgaŭa edzino rezervis la unuan gustumon de sia letero el fama viro. Por ambaŭ junulinoj, du litoj blanke lakitaj, ĉiu kun sia araba verso ore brodita sur velura panelo adaptita al la muro. Surplanke, aliaj improvizitaj kuŝejoj, matracoj kaj littukoj el blua aŭ roza atlaso, por kvar junaj virinoj invititaj al la edziĝfestoj. Sur la seĝoj (blanke lakitaj kaj kun silko Pompadour kun etaj bukedoj), tualetoj por riĉa edziĝo, ĵus alvenintaj el Parizo, kuŝis helaj kaj freŝaj. Malordo de antaŭtago de festego, kampadejon oni dirus, kampadejon de ciganinetoj, sed elegantaj kaj tre riĉaj. (Ĉar la mahometana leĝo malpermesas al la virinoj eliri post krepusko, fariĝis ĉe ili ĝentila kutimo tiel instaliĝi unuj ĉe aliaj, dum kelkaj tagoj aŭ kelkaj semajnoj, por iu ajn kaŭzo, ial ajn, eĉ por fari simplan viziton; kaj tiam oni aranĝas dormejon). Orientulinaj vualoj kuŝis ankaŭ dise, florornamaĵoj, juveloj el Laliko. La feraj kradoj, la lignaj vergetoj en la fenestroj donis sekretan aspekton al tiu disa lukso, celanta blindigi aŭ ĉarmi aliajn virinojn, sed kiun neniam viro kun lipharoj havos la rajton rigardi. Kaj, en angulo, du sklavaj negrinoj, en azia kostumo, senĝene sidantaj, kantadis ariojn el sia lando, ritmatajn sur tambureto kiujn ili frapis mallaŭte. (Niaj fieraj okcidentaj demokratoj povus akcepti lecionojn de frateco en tiu bonanima lando, kiu praktike ne konas kastojn

nek sociajn apartigojn, kaj kie la plej humilaj servistoj aŭ servistinoj estas ĉiam traktataj kvazaŭ familianoj.)

La eniro de la edziniĝonta naskis sensacion kaj miron. Oni ne atendis ŝin tiun matenon. Kio povis ŝin konduki? Tute nigra en sia strata kostumo, kiel ŝi aspektis mizera kaj funebra meze de tiuj blankoj, de tiuj rozoj, de tiuj palaj bluoj de silkoj kaj muselinoj? Kion ŝi ja venis fari, tiel neatendite, ĉe siaj honoraj akompanantinoj?

Ŝi relevis sian funebran vualon, malkovris sian delikatan vizaĝon kaj, per mallaŭta indiferenta tono, respondis france — kiu estis ja nepre familia lingvo ĉe la haremoj en Konstantinopolo:

—Leteron kiun mi volas al vi montri!

—De kiu la letero?

—Ha, divenu!

—El la onklino en Andrinopolo, mi vetas, kiu anoncas al vi brilantan ornamaĵon?

—Ne.

—El la onklino en Erivan, kiu sendas al vi paron da Angorkatoj, por via edziniĝdonaco?

—Ankaŭ ne. Ĝi estas el fremda persono... Ĝi estas... el sinjoro...

—El sinjoro! kia teruro!... El sinjoro! Vi ja estas monstreto!...

Kaj, kiam ŝi etendis sian leteron, kontenta pri sia efekto, du aŭ tri belaj blondaj kapoj, — el vera kaj falsa blondo, — kune sin puŝis por vidi la subskribon.

—Andreo Lhéry!... Ne! Nu do li respondis?... Ĝi estas lia?... Ne eble...

Ĉiuj estis ricevintaj la konfidencon pri la letero skribita al la romanverkisto. Ĉe la hodiaŭaj turkaj virinoj, ekzistas tia ribela solidareco kontraŭ la severa reĝimo de la haremoj, ke ili neniam perfidas sin unu la alian; eĉ se la peko estus grava anstataŭ naiva kiel la nuna, ĉiam oni havus la saman diskretecon, saman silenton.

Oni premis sin reciproke por kune legadi, haroj al haroj, ankaŭ fraŭlino Bonneau de Saint-Miron, tirante al si la paperon. Je la tria frazo rido eksplodis:

—Ho! vi vi — das!... Li pretendas ke vi ne estas turka!... Komika afero, ja!... Li estas tiel perfekta kompetentulo, ŝajne, ke jen li estas tute certa pri tio!

—He! sed tio estas ja sukceso, mia kara, — diris al ŝi Zeyneb, la plej aĝa el la kuzinoj, — tio pruvas ke la pikanteco de via sprito, la eleganteco de via stilo..

—Sukceso, — kontestis la flavruĝulineto kun altencelanta nazo, kun mieno ĉiam komike mokema, — sukceso!... Se ĝi venas de tio, ke li kredas vin *Peranino*, mi fordankas tian sukceson.

Oni devis ja aŭdi kiel estis elparolita tiu nomo *Peranino* (loĝantino de la kvartalo Pera). Nur en la maniero de prononcado, ŝi metis sian tutan malestimon de pura Osmanliidino kontraŭ la

Okcidentuloj aŭ Okcidentulinoj (Armenoj, Grekoj aŭ Hebreoj) el kiuj la Perano reprezentas la prototipon. (1)

—Tiu malfeliĉa Lhéry, — aldonis Kerimé, unu el la junaj invititoj, — li malfruas!... Certe li restis ĉe la Turkino de la romanoj el 1830^a: nargileo, konfitaĵoj kaj divano la tutan tagon.

—Aŭ eĉ tute simple, — daŭrigis Melek, la flavruĝulineto kun mokema nazpinto, — simple al la turkino el la tempo de sia juneco. Ĉar jam li devas esti iom kaduka, vi scias, via poeto!...

Kaj tamen tio estis vera, nekontesteble vera, ke jam ne plu povis esti juna Andreo Lhéry. Kaj, por la unua fojo, tiu konstato trudis sin en la animon de lia malgranda nekonata amantino, kiu neniam estis al tio ĉi pensinta: vere senreviga konstato, forpelanta ŝian iluzion, vualanta per melankolio ŝian adoradon al li...

Malgraŭ siaj ridetantaj kaj mokemaj mienoj, ili ĉiuj amis tiun malproksiman kaj preskaŭ nepersonan homon, ĉiuj tie babilantaj; ili amis lin ĉar li parolis kun amo pri ilia Turkujo, kaj kun respekto pri ilia Islamo. Letero el li skribita al unu al ili estis granda okazaĵo en ilia mallibera vivo, kie, ĝis la granda fulmkatastrofo de la edziniĝo, neniam io okazas. Oni relegis ĝin laŭte. Ĉiu deziris tuŝi paperan folion kie lia mano ripozis. Kaj poste, ĉar ĉiuj estis grafologoj, ili entreprenis sondi la misteron de la skribaĵo.

Sed envenis patrino, la patrino de la du fratinoj, kaj tuj, kun ŝanĝo de interparolado, la letero malaperis, subtile. Ne tial ke ŝi estus tre severa, tiu patrino, kun tiel trankvila mieno, sed ĉar ŝi tamen farus riproĉojn, kaj precipe ne komprenus; ŝi apartenis al alia generacio, tre malmulte parolis france kaj nur legis Aleksandro Dumas, la patron. Inter ŝi kaj ŝiaj filinoj malfermiĝis abismo, almenaŭ de du jarcentoj, tiel rapide la aferoj antaŭeniras en la hodiaŭa Turkujo. Eĉ flzike ŝi ne similis ilin, ŝiaj belaj okuloj malkaŝis naŭvan pacon kiu tute ne troviĝis en la rigardo de la admirantinoj de Andreo Lhéry: tio estas ĉar ŝi limigis sian teran rolon al tiu de afabla patrino kaj senpeka edzino, nenion pli celante. Cetere, ŝi malbone vestis laŭ eŭropa modo, kaj ankoraŭ mallerte portis tro ŝarĝitajn robojn, kiam ŝiaj filinoj kontraŭe sciis jam esti tiel elegantaj kaj delikataj kun tre simplaj ŝtofoj.

Nun faris sian eniron la franca instruistino de la hejmo, — ia Esther Bonneau, sed pli juna, pli fantaziema ankoraŭ. Kaj ĉar la ĉambro estis jam tro implikata, kun tiom da gastoj, da roboj ĵetitaj sur la seĝojn kaj matracoj surplanke, oni transiris en pli

(1) Kvankam akceptante la opinion de la Osmanlis pri la plej granda parto da Peranoj, mi konfesas esti renkontinta inter ili amindajn esceptojn, perfekte distingindajn kaj respektindajn virojn, virinojn kiujn oni trovas ravaj en kiu ajn lando kaj en kiu ajn medio.

grandan najbaran ĉambron, "modern Style", kiu estis la salono de la haremo.

Aperis tiam senfrape, tra la ĉiam malfermita pordo, dika germana sinjorino, kun peze plumornamita ĉapelo, kondukante je la mano Fahr-el-Nissâ, la plej junan invititan. Kaj, en la rondo de junulinoj, tuj oni ekparolis germane tiel facile kiel ĵus france. Estis la profesoro de muziko, tiu dika sinjorino, kaj efektive virino de nekontestebla talento; kun Fahr-el-Nissâ, kiu ludis jam artiste, ŝi ĵus ripetis dupiane novan aranĝon de fugoj de Bach, kaj ĉiu metis en ilin sian animon.

Oni parolis germane, sed sen pli da peno oni parolus itale aŭ angle, ĉar tiuj Turkinetoj legadis Dante aŭ Byron, aŭ Shakespeare en la originala teksto. Pli kleraj ol ĉe ni la plej multo el la junulinoj en sama socia klaso, sendube pro la mallibereco kaj longaj solecaj vesperoj, ili avido legadis la antikvajn klasikulojn kaj la grandajn modernajn senordigitajn; en muziko ili fervorigis por Gluck tiel same kiel por Cesar Franck aŭ Wagner, kaj deĉifris la partiturojn de Vincent d'Indy. Eble ili profitadis ankaŭ de la longaj kvietiĝo kaj intelekta dormetemo de siaj praaŭvinoj; en ilia cerbo, konsistanta el freŝa aŭ longe ripozinta materio, ĉio mirinde ĝermis, kvazaŭ en virga tero, la altaj frenezaj herboj kaj la belaj venenaj floroj.

La haremsalono, tiun ĉi matenon, pleniĝis ankoraŭ ĉiam; la du negrinoj sekvis ankaŭ kun sia tambureto. Post ili maljuna sinjorino envenis, antaŭ kiu ĉiuj sin levis respekte: la avino. Tiam oni ekparolis turke, ĉar ŝi neniom komprenis la okcidentajn lingvojn, — kaj kiom zorgis pri Andreo Lhéry, tiu maljunulino! Ŝia robo arĝente brodita estis el antikva modo, kaj cirkazia vualo envolvis ŝian blankan hararon. Inter ŝi kaj ŝiaj nepinoj la abismo de malkompreno estis absolute nesondebla, kaj dum la tagmanĝoj, pli ol unu fojon ŝi sukcesis indignigi ilin per la kutimo de ŝi konservita manĝi la rizon per la fingroj kiel la prauloj, — kvankam tiel farante, ŝi restis tamen granda sinjorino, granda sinjorino ĝis la pinto de la ungoj, kaj impona por ĉiuj.

Do, oni ekparolis turke, por respekto al la maljunulino, kaj subite la murmuro de la voĉoj fariĝis pli harmonia, dolĉa kiel muziko.

Nun aperis virino, eleganta kaj ondolinia, kiu alvenis el ekstere, kaj similis, kompreneble, tute nigran fantomon. Tio estis Alimé Hanum, profesoro agregaciulo de filozofio ĉe la liceo por fraŭlinoj fondita de Lia Imperiestra Moŝto la Sultano; kutime ŝi venadis trifoje ĉiusemajne instrui al Melek la persan kaj araban literaturojn. Kompreneble hodiaŭ ne okazas leciono, antaŭtago de edziĝo, tago kiam la cerboj estas malordigataj. Sed kiam ŝi relevis sian monaninan vualon kaj montris sian belan gravmienenan figuron, la konversacio falis pri la malnovaj Iranaj poemoj, kaj Me-

lek, serioziĝinta, recitis pecon el "Lando de la Rozoj" el Saadi.

Neniu signo de odaliskoj, nek nargileo, nek konfitaĵoj, en tiu paŝaa haremo, konsistanta el avino, patrino, filinoj, kaj nepinoj kun ŝiaj instruistinoj.

Cetere, kun escepto de du aŭ tri eble, ĉiuj haremoj en Konsantinopolo similas al tiu ĉi: la hodiaŭa *haremo* estas tute simple la virina parto de familio tute same konsistanta kiel la nia, — kaj edukita kiel ĉe ni, krom la mallibereco, krom la densaj vualoj por la strato kaj la neebleco interŝanĝi penson kun viro, se tiu ne estas la patro, edzo, frato, aŭ iufoje, por tolero, la tre proksima kuzo kun kiu oni ludis en infaneco.

Oni reekparolis france kaj diskutis pri tualetto, kiam homa voĉo, tiel pura ke oni dirus ĉiela voĉo, subite vibradis ekstere, kvazaŭ falanta el la supro de la aero: La Imam el la plej proksima moskeo alvokis el la pinto de la minareto la fidelulojn al la meztaga preĝo.

Tiam la fianĉineto, rememorante ke ŝia avino tagmanĝis tagmeze, elŝteliĝis kiel la Cindrulino, kun fraŭlino Esther Bonneau, ankoraŭ pli ol ŝi timanta pro la penso ke la maljuna sinjorino povus jam atendi. (*Daŭrigota.*)

Trad. el la franca: MARIAN SOLÀ, L. K.

NEKROLOGO

En lasta oktobro mortis la fervora esperantisto Tomàs Bernabé, kiu dum kelkaj jaroj estis kasisto de la grupo "Barcelona Stelo". Al liaj familianoj kaj al lia grupo ni esprimas sinceran kondolencon.

LA BALENGERO

La Balengero kun mistero,
 per aranea art', subtil',
 de l' Vivo tiras la fadenon,
 agas kaj agas la ŝpinil'.
 Al meditado ŝi inklinas,
 teksante por morgaŭa tag'.
 La Balengero ŝpinas, ŝpinas,
 senĉesa estos la ŝpinad'.

Ekrigardante malantaŭen
 ŝi vidas ombrojn de l' pratemp',
 kaj de la nova printemp' scias
 kie kaŝiĝas nun la sem'.
 Ŝi scias: trunk' des pli altiĝas,
 ju pli eniĝas radikar'.
 La Balengero ŝpinas, ŝpinas,
 senĉesa estos la ŝpinad'.

Kiam la par' edziĝofestas,
 jam ĝiajn filojn vidas ŝi;
 ŝi vidas, kiel en tomb' estas
 nuna sklavar' de l' iluzi',
 kiuj la stratojn kune iras
 por kora rido, por kantad'.
 La Balengero ŝpinas, ŝpinas,
 senĉesa estos la ŝpinad'.

Ĉiam en mov', ŝi fadenvolvos,
 kaj de l' patrujo la vizi'
 batigas eĉ la koron ŝian,
 maljunan koron sen pasi'.
 En la profunda nokt' trankvila
 ŝi vidas lumon de l' novtag'.
 La Balengero ŝpinas, ŝpinas,
 senĉesa estos la ŝpinad'.

El tradicioj kaj esperoj
 ŝi teksas flagon de l' junec',
 kvazaŭ ŝi iarus edzvualon
 el haroj—oro kaj arĝent'—
 de l' infanec' supreniranta,
 de l' laca jam maljunular'.
 La Balengero ŝpinas, ŝpinas,
 senĉesa estos la ŝpinad'.

Joan ALCOVER.

Muziko de Amadeu VIVES

El la kataluna trad. Jaume GRAU CASAS, L. K.

LA PETOLAJOJ DE AMO

Ĉapitro VII

(Fino.)

Malsuprenvenis la du fratinoj, kun kanabŝuoj kaj pajloĉapelo, kokete ornamitaj. Ili entreprenis kun la studento la vojon post la domo, kiu supreniris al montego. Kiam ili transpasis la interlimon de la arbaro kaj la vinberejo kaj malaperis sub la duonlumo de la pinoj, la *Cogull'oj*, patro kaj filo, de sur la monteto, ankoraŭ longan tempon okulsondadis la arbaron, nostalgiante klarumadon de juoj en la orumita verdo.

Ambaŭ malrapide reprenis la laboron. Illi montris la koleron kaj la ĉagrenon, pentritajn sur la vizaĝo. Precipe ĉe *Bielet*, la koro elforkuradis al *Lina*. Li koleris, esti devigata sin klini al vinbertrunkoj, dum ŝi saltadetas kun la studento tra boskoj. Kaj ili rifuĝis ĉe ombro de fonto, kuŝiĝos sur malvarmeta musko, *Lina* kun la studento apude, *Cori* iom pli malproksime... Malĝojo kaj kolero elprenis de li la emon labori.

Ĉe la patro, tio efikis alie. Li malbonhumoriĝis, lia cerbo pleniĝadis de malbonaj pensoj. Vidinte la studenton, vageme ĝuantan la akompanion de *Lina* dum li devas klini la kapon al la tero, li sin sentis viktimo de la socia maljusteco. Tial ke li ne povis kuniri kun *Lina*, brakon ĉe brako, tra la valoj, vidante sin rifuzita kiam la studento estis akceptata kun tiom da ceremonioj, en momentoj kiel tiu, kiam li vidis ilin foriri montsupren, ekbruladis tia kolerego en lia brusto ke ĝi povus elflamigi la mondon. Li ne konsideradis sian aĝon, nek sian edzecon, nek sian senkulturecon. Li nur rimarkadis, ke la alia kuniradas kun *Lina*, kaj li ne. Kaj tion li kredis maljusta, tiel maljusta kiel la neposedado de la tero, dum aliaj posedas ĝin je miloj. Kaj li silentadis kaj sin enpuŝadis al laboro kun sovaĝeco. Ju pli li silentadis, des pli plivigliĝis lia enpuŝo, ĝis klakado de dentoj, ĉar li apartenis al fortuloj, kiuj moderigas la pasiekscitojn per agado.

Por li, la plej granda diferenco inter riĉuloj kaj malriĉuloj konsistis el tio, ke la riĉuloj, kiam ili avidas iun virinon, ŝin alproprigas al si per la mono, per siaj elegantaj manieroj, per siaj grandsinjoraj vestoj kaj siaj vortoj de kleraj viroj. En sia malsukceso kun *Lina*, li ne vidis malsukceson de la viro, sed malsukceson de lia socia situacio. Ĉiam, kiam li pensis ĉion-ĉi, pro la miksiĝo en lia koro de envio, kolero kaj ĵaluzo, li eksplodadis kun siaj edzino kaj filo per senkaŭzaj kriadoj, ne mon-

trante la blankon de la okuloj, aŭ silentante dum du sinsekvaj tagoj.

Bielet, kontraŭe, velkis kaj sopiris, nostalgianta kaj revema.

Ili rekomencis labori, pripensante ĉiu siamaniere siajn aferojn. La patro, vidante la filon tiel senvigla, rigardadis lin strabe. Li divenis sub lia frunto la melankolion de liaj pensoj. Kaj li des pli enkoleriĝis, ju pli li vidis ke la filo malĝojiĝas. Li sondadis lian rigardon. Ŝajnis al li vidi malsekan helon en liaj okuloj. Momenton post momento li plikoleris. Tio ne plu estis furiozo pro la malforteco de la filo, sed la ĵaluza ponardo aliajn fojojn sentita, precipe antaŭ la alveno de la studento, kiam *Lina* akceptis la komplimentojn de *Bielet* kun plaĉa rigardo. Denove tiun posttagmezon la ĵaluzo revenis kun la kolero kaj la furiozo, ĵaluzo pro lia filo, nun pli forta kaj pli kaŝita ol tiu antaŭe sentita pro la studento. Kaj tio ne estis ĵaluzo pro flataĵoj, rigardoj aŭ alridetoj, sed envio pro la amsento kiun *Andreu* volonte eltranĉus el la koro de sia filo. Li sentis furiozon pro tiu pura kaj naiva amo, freŝa kiel la unua helo de la tagiĝo, apud lia amo, malklara kaj densa kiel acidiĝinta vino. Ju pli la posttagmezo progresis, des pli la malvigliĝo de *Bielet* kreskis, kaj *Andreu* sin sentis pli kaj pli furioza kaj ĵaluza. Li devigis lin labori pli ol liaj fortoj permesis. Kiam li vidis lin senfortiĝintan, li incitis lin tute same kiel oni faras kun mallaborema azeno, kaj diris al li:

—Nu, nu, peco da azeno! fantaziulo! Ĉu vi hodiaŭ trinkis sorĉaĵojn?

La knabo ne respondis. Atakita de sia patro, li ploris super la vinberujojn. Ekrimarkinte tiujn larmojn, *Andreu* ne plu povis sin deteni. Li suprenlevis la brakon kaj preskaŭ estis fraponta lin per bato de fosilo.

—Hundo! maldiligentulo! — li diris kun la fosilo altenlevita.

La knabo forkuris de lia flanko, plorante. Li ne plu povis rezisti.

Vidante lin supre de la deklivo, *Andreu* ekkriis:

—Anstataŭ plori kiel suĉinfano, pli bone estus, se vi lasus lin senviva, per ŝtonbato, por ke ne restu al li deziroj reveni al la *Comba*.

La knabo haltis subite. Li aŭskultis kvazaŭ li atendus el la patraj lipoj aliajn vortojn.

—Se vi, ja, ne faros tion, ĝin faros mi mem! — findiris *Andreu*.

Bielet foriris plorante. Li estis fininta siajn fortojn. Li ne havis emon reiri al la laboro. Kaj li sin sentis honta, ke lia patro divenis liajn koraferojn. Kvazaŭ plenaĝa viro, li klopodadis reteni sian pasion fermita en sia brusto, kaŝita al ĉiuj krom al *Lina*. Sed lia patro malkaŝis ĉiujn liajn pensojn. Tio furiozigis kaj dolorigis lin, ĉar li komprenis ke, se lia patro ne estus enamiĝinta je *Lina*, neniam li estus kapablinta eniri tiel ĝisfunde

en lian fermitan bruston. Kaj li ankaŭ sentis ĵaluzon je sia patro. Kelkafoje eĉ pli ol je la studento. Kaj tiel same kiel ĵaluzon, li sentis honton, ĉar tiu amo de lia patro al *Lina*, ŝajnis al li abomena kaj malklara.

Estis la vesperiĝa horo. *Bielet* malsupreniris la deklivon, plorema. Ĉe la alia deklivo, *Andreu* havis la bruston skuita de diversaj kolerkirloj: kontraŭ sia filo, kontraŭ sia edzino, kontraŭ *Lina* kaj la studento, kontraŭ la mizero, kontraŭ la tero subtenanta lin, tial ke ĝi ne estis lia.

Kvazaŭ el tiuj kolerskuoj iu ero estus atinginta al *Bielet*, tiu ĉi subite ĉesis plori, tute instigita de tiuj vortoj: Estus pli bone, ke vi sensentigu lin per ŝtonbato, tiel ke ne restus al li deziro reveni al la *Comba*.

Instinkte la infano prenis ŝtonon kaj ĝin ĵetis tra la aero, rapidan kaj sibilantan, kvazaŭ ĝi estus elirinta el ŝtonĵetilo. Oni dirus, ke li provlernadas.

JOAN PUIG I FERRETER

Trad. el la kataluna: ARTUR DOMÈNECH MAS

BIBLIOGRAFIO

EN OKCIDENTO NENIO NOVA.—De Erich Maria Remarque, el la germana lingvo tradukita de "Kvar". 252 pĝ. Eldonis: Heroldo de Esp., Köln. Prezo: 5 RM.

Jen verko, kiu ne bezonas rekomendon, ĉar ĝi estas tiu, kiu akiris plej grandan popularecon en plej mallonga tempo. De libroj pri militaj travivaĵoj ekzistas nombro, sed sendube la plej fama estas tiu ĉi. Ĝia eldonnombro vere estis io eksterordinara. Je la dato de la Esperanta eldono (1929) estis presitaj en la diversaj lingvoj pli ol du milionoj da ekzempleroj. Laŭ la lastaj raportoj, ankaŭ la Esperanta eldono estis granda sukceso. La *Kvaro*, nome: ĉefredaktoro Teo Jung, redaktoro Jos. Berger, Prof. D-ro Hans Ellinger kaj instruisto W. Hoffmann, bone solvis sian taskon traduki primilitan verkon, enhavantan multajn fakajn esprimojn; pro tio estis uzataj kelkaj novaj vortoj, kies signifo estas klarigata en aldona terminareto ĉe la fino de la libro. Ĉar la verko estas tre konata de la leganta publiko, almenaŭ en la nacilingvaj eldonoj, ni ne faros priskribon pri ĝia signifo—kiun, pro ĝia vereco en objektivismo, ni povas kvalifiki kontraŭmilita—nek pri ĝia stilo, miksaĵo de poezio kaj filozofio eltirata el unu el la plej teruraj travivaĵoj. Tamen, ni rekomendas al ĉiu Esperantisto, eĉ se li legis tiun verkon en iu nacia eldono, eĉ en la originalo mem, ke

li legu ĝin por komparo kaj ekzerco en Esperanta traduko, kiu certe estas unu el la plej fidelaj, tiel pro la lerteco de la tradukintoj, kiel pro la adaptebleco de nia lingvo.—J. A. P.

WIEN KAJ NIEDEROSTERREICH.—Sub ĉi tiu titolo ĵus eldonis la "Komisiono por fremdulfrekvento de la Liglandoj Wien kaj Niederösterreich" (Malsupra-Aŭstrio) 16 paĝan falditan gvidfolion kun bela titolbildo kaj 27 en la teksto troviĝantaj arte reproduktataj fotobildoj pri vidindaĵoj en Wien kaj Niederösterreich. La teksto entenas ekzaktajn informojn pri ĉio sciinda por vojaĝanto per fervojo aŭ aŭtomobilo, pri vivkostoj en Wien, pri potaĝaj programoj de l'vizitanto kaj pri la belaĵoj de la ĉirkaŭaĵo. Ĉi tiu belega gvidfolio certe estas taŭga por allogi ties posedantojn al vizito de la ĉefurbo Wien kaj la lando Niederösterreich. Speciale niaj alilandaj samideanoj povas esti certaj, ke ili ĝuos ĉie en la rondo de esperantistoj la plej koran akcepton kaj gastamon.

La Esp. traduko el germana originalo, farita de reg. kons. H. Steiner, prez. kaj fond-into de IEMW. estas perfekta.

La gvidfolio estas ricevebla por aliland-anoj pere de IEMW.

INTERNACIA KANTARO. Kolekto de 139 popolaj kantoj el 55 landoj, 7 esperantaj kantoj, rondkantoj kaj kantsalutoj, 3 famaj koncertarioj; kolektitaj, grandparte tradukitaj kaj prilaboritaj de Paul Bennemann, L. K. Muzika eldono. Eldonejo Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

Prezo: 3.50 RM.

Jen verko tre bone prezentita kaj presita, kies enhavo laŭ ĉi supra indiko, estas alfabete katalogita en oportuna indekso esperanta kaj nacilingva, montranta la titolojn de la kantoj. Pri la aranĝo de tiuj ĉi, ni nur devas diri ke ĝi estas farita de Paul Bennemann, kies sperteco en tiu kampo estas sufiĉe konata. Multaj el la popolaj kantoj estas ĉarmaj specimenoj el la popola muziko kaj poezio, kaj tiu ĉi verko estas pruvo de la fleksebleco de Esperanto por arte esprimi la poezian senton, kiu en la kantoj abundas. Tre rekomendinda verko, kiun devus aĉeti ĉiu literatur—kaj muzikamanto kaj precipe la Esperantistaj Grupoj por viviĝi siajn literaturmuzikajn vesperkunvenojn, aldonante al la programoj kelkajn kantojn en Esperanto. Por tiu verko ekzistas tekstaro, kies prezo estas 1'50 germanaj markoj.—J. A. P.

PRI LA NOVA "IBERIA ESPERANTISTA REVUO"

Jam aperis la unua numero de dumonata IBERIA ESPERANTISTA REVUO, kun 48 paĝoj, tre bele presita. Jen la enhavo: SALUTO. — "HISPANA ANTOLOGIO". — DUA ELDONO DE "KATALUNA ANTOLOGIO". — LA EXPRESION LITERARIA EN ESPERANTO, hispanlingva artikolo pri la literaturaj eblecoj de Esperanto, de J. G. C. — TRI BENOJ, poemo de K. de Kalocsay, kaj TRES BENEDICCIONS, ĝia katalunlingva traduko. — VI ESTAS LA PACO, unua ĉapitro de novelo de la hispana Gregorio Martínez Sierra. — AL AMATINO DORMANTA, poemo de Artur Domènech Mas. — DIOJ DE MILITO, de Maurice Maeterlinck. — Tri poemoj dediĉitaj AL JULIO BAGHY, AL NIKOLAO HOHLOV, AL K. DE KALOCSAY, de Jaume Grau Casas. — LA FORGESEMA SENDITO, de Renée Erdos. — BIBLIOGRAFIO. — LA VESPERMANĜO DE LA KARDINALOJ, lasta sceno de versa teatraĵo de la portugala Julio Dantas. — RILATO KUN HOMOJ, de Prentice Mulford. — WALT WHITMAN, soneto per kiu la hispan-amerika Rubén Darío gloras la faman Usonan poeton. — LA ESPERANTO-MOVADO EN IBERIO. — EL MOVIMIENTO ESPERANTISTA MUNDIAL, tripaĝa artikolo en hispana lingvo, informanta pri la Esperantista organizacio. — ADMINISTRACIA AVIZO.

Kelkaj el la diritaj verkoj estas premiitaj de la Internaciaj Floraj Ludoj, al kiuj dediĉos grandan atenton la nova IBERIA ESPERANTISTA REVUO. Ĝi certe estos la sola Esperanto-revuo publikiganta en unu sama numero longajn literaturaĵojn aŭ sciencajn artikolojn.

La Direktoro-Eldonanto de IBERIA ESPERANTISTA REVUO estas S-ro Jaume Grau Casas, L. K., kompilinto de la KATALUNA ANTOLOGIO kaj preparanto de la HISPANA ANTOLOGIO. Adreso de la revuo: Diputació, 50. Barcelona. Abono: Por Iberio: Unu jaro, 9 pesetoj. Duonjaro, 4'50 pesetoj. Por aliaj landoj: Unu jaro, unu dolaro.

* * *

"KATALUNA ESPERANTISTO", kiu ĉiam deziris plenan konkordon, rekomendas al siaj legantoj la abonon al "IBERIA ESPERANTISTA REVUO". Ni ne laŭdos ĝin, ĉar la Direktoro-Eldonanto de I. E. R. samtempe estas Direktoro de K. E. Ni nur deziras atentigi, ke S-ro Jaume Grau Casas laboras tute honore, kaj ke li imagas bone komprenata de ĉiuj katalunaj samideanoj, fice, kaj ke li imagas bone komprenata de ĉiuj katalunaj samideanoj je la Iberia kulturo.

NOVAJ AMAJ POEMOJ

DE

JAUIME GRAU CASAS, L. K.

20 originalaj poemoj en facila Esperanto
32 p.-libreto 16 x 22 cm., kun fortaj kovriloj

PREZO: Por Iberio, Ptoj. 0'70; por aliaj landoj, 1 peseto.

Tarifo de reklamoj

Unu p.: Dek pesetoj

Duona p.: Kvin pesetoj

LASTA KOVRILPAGHO: 15 PESETOJ

Anonceto pri korespondado: 1'50 pesetoj

RABATO POR PLURFOJA ENPRESO!

IBERIA ESPERANTISTA REVUO

DIPUTACIÓ, 50 - BARCELONA

REDAKTATA EN ESPERANTO

KAJ EVENTUALE EN LA KVAR IBERIAJ LINGVOJ: HISPANA,
PORTUGALA, KATALUNA KAJ BASKA

DUMONATA 48 P. (16 $\frac{1}{2}$ × 24 cm.)

LITERATURO :: INFORMADO :: PROPAGANDO

DIREKTORO - ELDONANTO:

JAUME GRAU CASAS, L. K.

DIREKTORO DE «KATALUNA ESPERANTISTO»

JARABONO:

POR IBERIO: 9 PESETOJ

POR ALIAJ LANDOJ: 1 DOLARO

SCIIGU TUJ VIAN ABONON!